

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:

Aurora Bute

Augusto Casquero

Ivan Eidt Colling

Péter Gerő

Mireille Grosjean

Oleg Izyumenko

Marija Jerković

Katalin Kováts

Lee Jungkee

Stefan MacGill

Rob Moerbeek

Gilda Muñoz Bonilla

Johann Pachter

Radojica Petrović

Tea Radovanović

Heike Schüssler

Gong Xiaofeng



ENHAVO

Jozefo NÉMETH: <i>Enkonduko</i>	3
Stefan MACGILL: <i>Nova epoko por ILEI</i>	4
Aurora BUTE: <i>Serioza laboro dum la ILEI-Konferenco</i>	5
<i>Rezolucio de la 43-a Konferenco de ILEI</i>	7
<i>Komitataj decidoj en Matanzas</i>	8
Radojica PETROVIĆ: <i>Konferenca omaĝo al Maŭro La Torre</i>	9
Oleg IZYUMENKO: <i>'Interkulturo' retrovas siajn flugilojn</i>	10
Ivan EIDT COLLING: <i>Ni semas kaj semas...</i>	12
<i>ILEI aktivis dum la UK (Stefan MACGILL)</i>	16
Katalin KOVÁTS: <i>Tre sukcesaj someraj sesioj en la KER-ekzamenoj</i>	21
Mireille GROSJEAN: <i>KAEM en Ulan Batoro</i>	23
<i>El la landoj kaj sekcioj (CN, DE, KR, HR, MX, PL, CH)</i>	25
Péter GERŐ: <i>Letero de eksterulo – pri ebla eksperimento metodologia</i>	34
Rob MOERBEEK: <i>La naŭa</i>	38
<i>44-a konferenco de ILEI, Kopenhago 2011 (alvoko)</i>	40

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Stefan MACGILL, Pannónia u. 30.I.6, HU-1136 Budapest, Hungario.
Tel. (+36 1) 349-5207, <stefan.macgill@gmail.com>.

Eksteraj rilatoj, kunordigo, konferenco, regularoj.

Vicprez.: Duncan CHARTERS, PO Box 100, Elsah, Illinois 62028-0100, Usono.

Tel. (+1) 618 3745252, fakso: (+1) 618 3745465, <duncan.charters@gmail.com>.

Universitata kaj scienca agado/komisiono, instru-teknologia evoluo.

Sekretario: Małgosia KOMARNICKA, ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin,
Pollando, <margareta.ilei.pollando@gmail.com>. Sekretariaj taskoj.

Estrarano pri financoj: Julija BATRAKOVA, Rusio/Hago, Nederlando. Tel. (+31)
252 515331, <persiko@mail.ru>. Financaj kaj kasistaj aferoj.

Estrarano: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412
Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983,
<zsofia.korody@esperanto.de>. E-centroj, instrukapabligado, eksamenoj.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobođenja 36/14, RS-32000 Čačak,
Serbio. Tel. (+381 32) 371053, fakso: (+381 32) 342101, <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Edukprojektoj, informado, Konf. 2011, terminara komisiono.

Estrarano: Julián HERNÁNDEZ ANGULO, Arbol Seco 371B e/Clavel y Santo
Tomás, Centro Habana, Ciudad Habana, Tel. (+53) 6404484,
<julian@esperanto.co.cu>. Landa agado, komisiono pri lerneja agado.

Titolpaĝe supre: ILEI-seminarianoj en Kubo; *malsupre:* tri sekcioj en la seminario de ILEI-Ĉinio (de maldekstre): Gong Xiaofeng (CN), Ronald Glossop (US/CA), Tiekō Isikawa (JP).

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Vera Barandovská-Frank,
Germanio, Universität Paderborn;
AIS² San Marino

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elŝah

Renato Corsetti, Italio, Università
degli Studi di Roma „La Sapienza”;
AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute, Kolkata;
AdE¹

Michel Duc Goninaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas

Wim Jansen, Nederlando,
Universiteit van Amsterdam

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Ilona Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Maria Majerczak, Pollando, Uniwer-
sytet Jagielloński w Krakowie

Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia
Universitato de Paranao; AdE¹

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяйственного
Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

Sekretario: Aida Čižikaitė, Litovio

¹ AdE – Akademio de Esperanto

² AIS – Akademio Internacia de la
Sciencoj, San-Marino

Enkonduko

Karaj Legantoj,

mi havas la privilegion legi la unua
ĉiujn novajn numerojn de IPR. La
nuna numero povus esti eĉ duobla:
tiom multe da materialo kolektiĝis.
Bedaŭrinde, la paĝonombro estas
limigata, do, la duan duonon legis nur
mi... ☺

Dum la someraj monatoj okazis
multo pri ILEI. Malgraŭ la komencaj
timoj, nia Konferenco en Matanzas
bone sukcesis. Legu la artikolojn de
MacGill, Bute kaj Petrović. Antaŭ la
konferenco kaj paralele kun ĝi okazis
seminarioj (en Slovakio kaj Kubo)
Flugiloj de interkultura vento; la no-
va titolo estas omaĝo al nia forpasinta
kolego, M. La Torre (vd la artikolojn
de Petrović, Izyumenko kaj Colling.)

En la nuna numero aperas raportoj
pri tri aziaj eventoj. Azia kolego en
KAEM plendis, ke „oni ofte nenion
povas legi” pri Azio. Ni esperu, ke
kun la fortiĝo de ILEI en Ĉinio,
Koreio kaj aliaj aziaj landoj, tiu
situacio ŝanĝiĝos.

En nia Leterkesto vi povas legi
artikolon de hungara pedagogo/
metodologo, kiu ĝis nun restis ekster
la E-movado, sed nun serĉas kunla-
borantojn por sia ebla eksperimento.

Bonan legadon!

Jozefo NÉMETH,
redaktoro
23 aŭgusto 2010

Nova epoko por ILEI

ILEI transformas sin. La lastaj kvar konferencoj okazis en kvar kontinentoj: 2007 en Ranzan (Japanio), 2008 en Portonovo (Benino), 2009 en Krakovo (Pollando) kaj 2010 en Matanzas (Kubo). Inter la 17-a de julio kaj la 21-a de aŭgusto, okazis en tri kontinentoj eventoj organizitaj de ILEI aŭ kun ĝia subteno: unue nia amerika konferenco-seminario, due en Ĉinio somera seminario en Taiyuan, trie trejnkurso en Bubanza, Burundo. Neniam en la 61-jara historio de ILEI okazis io eĉ iomete simila al tio. Ĝia strategio de tutmondigo klare portas fruktojn; nun ni havas grandan defion sekvi la latinamerikan elpaŝon, la ĉinajn kaj koreajn reviviĝojn, kaj la afrikan agadon.

Nia konferenco en Matanzas estas la dua plej granda ekstereŭropa evento de ILEI. Salutinde, inter ni estis solida grupo de kubaj prelegantoj kaj partoprenantoj. Ni aparte aprezas la aktivan partoprenon de Julián, Maritza kaj aliaj, spite iliajn premajn UK-devojn. De komenco ĝis fino regis pozitiva, agrabla etoso; dank' al la seminario, ni havis laŭdindajn aĝan kaj geografian gamon. Ne eblas nei, ke ni havis organizajn defiojn, precipe en la unua plena tago, tamen ni adaptis nin al tio, tiel ke pluraj kontribuantoj ripetis siajn prelegojn – unufoje por la konferenco, denove por la seminario. Ni adaptis nin por travivi sen fotokopiado, kaj tamen diversmaniere atingis reton, por ke la membroj kaj movado informiĝu pri la aranĝo. Kohera programo zorgis pri tio, ke ni ekskursu kune, kaj sekve ĉeestu la laborajn kaj fakajn programojn kune. La aludita etoso floris ĉefe vespere, kun seminarioj kaj konferencanoj kunaj, por kviza, kuba, latinamerika kaj internacia vesperoj. La Komitato de ILEI, kvankam nekvoruma, aprobis utilajn aferojn, kiujn ni per fizika voĉdono celas aprobigi poste en la jaro. La Lingva Festivalo permesis al la konferenco prezenti sin publike en la centro de Matanzas kaj vekis grandan intereson.

Ni kore dankas al la teamo de LKK, precipe al Marta Alonso Gutiérrez, ankaŭ al nia komisiito pri la konferenco, Ana Montesinos, precipe pro ŝia februara vizito kaj raportado kaj surloka prizorgado. Ni dankas al Radojica Petrović kaj Martin Schäffer pro la epokfara seminario, kiu malfermas al ILEI la vojon al la cetera Latinameriko preter Brazilo, se ni nur kuraĝas arigi la rimedojn ekspluati la entuziasmon kaj agemon de la junaj seminariintoj.

ILEI aktivis preterforte en la UK. Saluto dum la malfermo starigis klare niajn prioritatojn kaj starpunktojn. La Tago de la Lernejo sendiskute nin bone prezentis (vidu poste), du IKU-prelegoj kaj iuj eroj de la kleriga lundo estis edukrilataj, nia budo kaj partopreno en la movada foiro (dankon al Simon, Hazel kaj pliaj) levis nian profilon. Ni partoprenis (kun miksitaj sentoj) en la komitato de UEA; la subkomitato pri edukado transdonis plurajn rekomendojn, poste akceptitajn de la komitato (vidu apartajn raportojn). La nova Strategia Plano por 2011-2020 bezonas ankoraŭ multan laboron; ILEI estas plektita en la laborgrupo kiu plenumos tion, difinante prioritatajn celojn kaj akiron de rimedoj por la ligitaj realigaj projektoj. Ĉiurilate, nova epoko.

Stefan MACGILL (Hungario/Nov-Zelando)
Prezidanto de ILEI

Serioza laboro dum la ILEI-Konferenco

Ĉi-jare, en Matanzas, la ILEI-anoj bone kaj serioze laboris, multflanke kaj diverse. La programo de la konferenco estis densa kaj varia, nur duhora libera tempo dum la tago; ĉiu mateno komenciĝis per tagaj informoj kaj finiĝis per tuttaga resumo, neniuj programeroj estis forlasata (kaj estis multaj!), eĉ oni aldonis kelkajn. La etoso estis dinamika, la ritmon donis la laborema prezidanto Stefan MacGill. Eĉ se la lingva festivalo ne estis antaŭpreparita, dum la taga libera tempo (!) ni diligente preparis ĝin. La centra urba placo estis ideala loko por tia aranĝo, la preterpasintoj promenis de tablo al tablo, starigis demandojn. Mi rimarkis du kubajn knabinojn, kiuj ege interese sekvis la prezentadojn, kaj eĉ post la translokigo de la festivalo en la urban bibliotekon pro la ŝtorma pluvo, ili ne rezignis, sed venis kaj scivoleme interesiĝis pri lingvoj. Laŭ mi, ĝi estis la plej sukcesa ĝisnuna tia aranĝo; la publiko estis ne nur ni, la aliaj festival-anoj, sed precipe kubanoj. La aranĝo trafis la celon!

La dumkonferencaj prelegoj, fare de la kubanoj, estis strikte ligitaj al la temo kaj prezentis tre valorajn aferojn: krom fakaj aspektoj de la instruado, post enkonduko en la kuban historion kaj kulturon – neceso por iom koni la gastigantan socion – ni eksciis pri la sukcesa programo de alfabetigado, modelo en la Latina Ameriko. Tiuj estis veraj novaĵoj por ni, la alikontinentanoj, kaj tiamaniere ni iom komprenis la kuban sistemon, atentan

al du gravaj sociaj kampoj: la instruado kaj la sansistemo (la lasta estis prezentata dum la UK). En Matanzas „blovis freŝa vento” pro la seminarianoj, plejparte junuloj, ne iaj ajn junuloj, sed scivolemaj kaj laboremaj. Dum la vespermanĝoj ofte ni vidis junulojn farantajn la hejmtaskojn, apud la naĝejo, grupete. Dum la libera tempo, ili (ne, ne naĝis! sed) parolis pri gramatikaĵoj! Mi memoras iun seminarianon, kiu volis konversacii kun eksterlandano; iu instigis lin veni al mia tablo dum la vespermanĝo. Timeme li ekparolis, sed poste la interparolado facile disvolviĝis. Mi rimarkis ĉe li tre seriozan pritrakton de la seminaria laboro; li konsciis, ke li akiris sciojn ne nur pri la lingvo, sed ankaŭ pri instrumentadoj kaj konfesis, ke li, kiel kursgvidinto, estis iom ... tro indulga. Se ankaŭ aliaj seminarianoj rigardis en sin mem kaj analizis sian ĝisnunan E-laboron por plibonigi la venontan, la seminario vere efikis.



Komitatkunsido en Matanzas

La lastan tagon, mi donacis kelkajn ekzemplerojn de nia landa E-revueteto ES-TO al kelkaj seminarianoj. Tuj ĉirkaŭis min la junuloj, ĉu vi havas ankaŭ por mi? Konferencano rimarkis, ke ES-TO estas bona revuo, sed.... la bildoj devus esti koloraj. Nu, por la junuloj ne gravis la koloroj, sed la enhavo, ili volis LEGI la revuon. Tian scivolemon, tiun emon labori POR E-o, oni devus espluati. Kiu faru tion? ILEI estas la bakujo, por ke la junuloj komencu per bona lingvo kaj adekvataj instrumentadoj! ILEI povas,

kapablas kaj devas fari tion – Radojica jam fariĝis la paĉjo de tiaj seminarioj – mi ne scias ĉu la monrimedoj sufiĉas.

Laŭ mia opinio, seminarioj devus okazi dum ĉiuj ILEI-Konferencoj. Ĉu venontjare, por la konferenco en Danio, oni povus starigi projekton pri interkulturo kaj peti monon de la Eŭropaj instancoj? Antaŭ la Kubaj E-aranĝoj ĉi-jaraj, okazis en la reto kritikoj al UEA, pro la organizo de UK en komunista lando. La kritikint(ist)oj devintus iri al Kubo por vidi la ĝojon kaj la ĝuon de la kubanoj! Ili ne povas partopreni aranĝojn en E-ujo! Estas kubanoj, kiuj neniam forlasis sian landon kaj eble neniam faros tion! ILEI monsubtenis kelkajn kubanojn por ekzameniĝi laŭ la nova Eŭropa referenckadro. Ili neniam povintus fari tion, neniam povintus mem kontroli sian parolkapablon, siajn lingvosciojn. Ni ne rajtas lasi ilin izolitaj! Stariĝis amikecoj, ni interŝanĝis adresojn, ni korespondados. Kubo havas nun novajn ligojn al Esperantujo. Ĉi-jaron Esperantujo iris al Kubo, kaj la kubanoj amike, plenkore akceptis nin!

La konferenco, la UK, estis donaco por ili!

Aurora BUTE (Rumanio)

Rezolucio de la 43-a Konferenco de ILEI

(Ĉi tiu rezolucio ne celas resumi la ĉefajn konferencajn laborojn, nek ĝian temon. Ĝi markas la nomigon de komisiito pri UN-agado ĉe ILEI, kiu estas s-ro Rob Moerbeek el Nederlando.)

La 43-a Konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) kunveninte sesdekope el pli ol 25 landoj de la 11-a ĝis la 17-a de julio 2010 en Matanzas, Kubo, traktinte la temon 'Edukado por kultura proksimiĝo'

esprimas sian apogon al la iniciatoj de Unuiĝintaj Nacioj (UN) kiel la Mondaj Tagoj de la Oceanoj kaj de la Paco, atentonte la iniciatojn en sia instruado,

kaj substrekas la gravecon strebi trovi solvon de la mondaj konfliktoj, prefere al armita intervenado per paca intertraktado en neŭtrala egalrajtiga lingvo, surbaze ankaŭ de samrajtigo en la tutmondaj ekonomiaj rilatoj. Nome E-o delonge pruviĝis konvena rimedo kiel interkomprenilo, taŭga por konsciigo por nia respondeco pri la komunaj valoraĵoj materiaj kaj spiritaj.

Decidite en la konferenca fermo en la 17-a de julio, 2010

Komitataj decidoj en Matanzas

La komitato havis 12 validajn voĉdonojn, sed por kvorumo necesus 17. Sekve la decidoj devos esti ratifitaj per poŝta voĉdono:

7.3.2 (Statuto) deklaras nur, ke devas esti minimume kvin membroj por fondi sekcion, sen difini kiaj membroj. Nek estas klara daŭriga kondiĉo. La komitato proponas aldoni al la regularo ĉe 7.3.2 „Por fondi sekcion, devas esti 5 membroj de la Ligo (internaciaj membroj) en la koncerna teritorio en la jaro de la petodono, kaj devas resti minimume 5 tiaj membroj ĉiujare por la pluvivo de la sekcio.”

7.3.3.1 (Regularo) deklaras, ke kandidata sekciestro devas esti membro de la Ligo (do internacia membro) en la du jaroj antaŭ la endono de la peto. Ŝajnas, ke la komitato en Parma jam ŝanĝis tion al unu jaro, sed tio estis nek proklamita nek realigita. La komitato proponas konfirmi la decidon kaj ŝanĝi la vortumon al "dum unu jaro".

7.3.4.1 (Regularo) deklaras, ke kandidato por reprezentanto devas esti Liga membro dum unu jaro antaŭ la endono de peto fariĝi reprezentanto. La komitato proponas ŝanĝi tion analoge, tiel, ke sufiĉu, ke la kandidato estu internacia membro "en la jaro de proponado".

La nuna regularo postulas, ke por akcepti reprezentanton devas esti kvin membroj. La komitato proponas lasi tiun malprecizan vortumon, tiel, ke la ekzisto de kvin enlandaj membroj estu valida plenumo de la kondiĉo.

La komitato plie interpretas la statutajn citojn pri la neceso por "skribaj" dokumentoj. La komitato akceptas, ke ankaŭ elektronikaj dokumentoj estas "skribaj" aŭ "skribitaj", kaj ili estu akceptataj, kondiĉe je sufiĉaj protektoj por certigi la identecon de la sendintoj. La estraro estas taskita evoluigi tiajn protektojn. La komitato akceptas la intencon de la estraro aktivigi la Regularan Komisionon por proponi ĝisdatigojn en la regularo por konformigi ĝin al la novaj ebloj de la reta epoko.

La komitato plie akceptis la raportojn de la estraro pri la jaro 2009 kaj senŝarĝigis la estraron pri la plenumo de siaj taskoj por tiu jaro. La komitat-kunsidon protokolis s-ro Simon Smits el Nederlando.

La komitato akceptis senmodife la aktualigitan vortumon de la Inter-konsento UEA-ILEI, kiun la komitato de UEA traktos dum la UK en Havano. *[vd p.19]*

La komitato akceptis la proponatan regularon pri reta voĉdonado, post propono modifi la alineon 11 por klarigi la intencon. Ĝi tekstu: "Akceptita decido estos efektivigita tuj post la fino de la voĉdona periodo, sed ĉiuj rete

traktitaj voĉdonoj estos reviziitaj de la komitato en ĝia sekva kvoruma fizika kunsido por konfirmi aŭ modifi la decidojn."

Konferenca omaĝo al Maŭro La Torre

Dum la solena malfermo de la Konferenco ni omaĝis per silenta minuto forpasintajn gekolegojn, kaj ni interkonsentis aparte omaĝi dum la konferenco nian eksprezidanton kaj multjare elstaran aganton, Maŭron La Torre. Efektive, la dumkonferenca seminario *Flugiloj de interkultura vento* estas la plej bona omaĝo, kiun ni povis fari al li, ĉar ĝi daŭrigas kaj realigas la ideojn, kiujn Maŭro ĝermigis per la projekto *Interkulturo*.

Interkulturo estis unu el la kernaj projektoj de ILEI fine de la pasinta kaj plejparte dum ĉi tiu jardekoj, kaj nun gravas revivigi kaj daŭrigi ĝin. Ĝi ne nur populariĝis en Esperantujo kaj lernejoj, kie E-o estis instruata, sed ankaŭ vekis intereson kaj levis la prestiĝon de ILEI en internaciaj konferencoj pri interkultura edukado (Unesko, Linguapax, FIPLV). Ĝi gajnis al ILEI subvenciojn de ESF kaj Eŭropaj fondaĵoj por junulara agado. Tio grave helpis la ekonomian kaj organizan stabiliĝon de la Ligo, kiu nun paŝas kun nova elano kaj novaj agadideoj.

Estis mia persona privilegio kaj plezuro kunlabori kun Maŭro. Per *Interkulturo* li inspiris min reaktiviĝi en la Movado post plurjara foresto, kaj li akceptis min en la teamon. Jaroj da proksima kunlaboro kaj sincera amikeco konatigis min kun lia pedagogia penso, kiun mi klopodis sekvi. Eĉ liaj lastaj mesaĝoj, kiam la malsano ligis lin al lito, radiis kuraĝigan entuziasmon kaj optimismon pri liaj novaj projektideoj proponataj al la Universitato kaj al ILEI. Unu el ili, ampleksa kaj komputile subtenata studado de pedagogia terminaro paralele en Esperanto kaj aliaj lingvoj, jam estas semita en la rondoj de esperantistaj komputillingvistoj kaj oni pri-pensas ĝian realigadon.

Estas nia ŝuldo al Maŭro daŭrigi liajn projektojn, subteni la formadon de interkulturaj esperantistaj pedagogoj, plu evoluigi kaj ĉiam disvastigadi la interkulturan lernadon kaj edukadon per E-o sekvante liajn gvidideojn. Tion ni faris per la ĉi-konferenca seminario kaj daŭre faros per novaj aranĝoj kaj E-pedagogiaj projektoj.

*Radojica PETROVIĆ (Serbio),
estrarano de ILEI*

‘Interkulturo’ retrovas siajn flugilojn

de **Oleg IZYUMENKO** (Svedio/Rusio), <oleg@ikso.net>

Seminario kun la titolo *Flugiloj de malfacila vento* jam ne estas tute nova fenomeno kadre de pli konataj E-renkontiĝoj, ekzemple IJK kaj IS. Ĝi celas instigi esperantistojn levi siajn gramatikajn, metodikajn kaj didaktikajn sciojn kaj kapablojn kaj prepari ilin por la rolo de instruisto de E-o. Tial estis tute logike organizi la *Flugilojn* ankaŭ kadre de SES (Somera E-Studado, konata kiel lernu!-renkontiĝo organizata ĉiujare de E@I), okazinta komence de julio 2010 en la okcidentslovakia banloko Piešťany. La *Flugiloj* havas sian logikan lokon en SES, ĉar la tuta ideo de SES estas lingvo-perfektigo, kun vasta propono de diversnivelaĵoj kursoj, taŭgaj por diversaj fonaj scioj kaj lernpreferoj de la partoprenantoj. Inter ili ĉiam troviĝas certa kategorio de e-istoj, kiuj jam sentas sin sufiĉe spertaj movade kaj lingve, kaj malkovras en si internan brilon disvastigi E-on kaj helpi novajn homojn ekkoni, lerni kaj perfektigi la lingvokononon. Ĝuste por tiuj instruemuloj la seminario *Flugiloj* estas tre utila kaj kuraĝiga preparo.

Ĉi-foje ĝia kutima nomo estis iom ŝanĝita por substreki la interkulturan karakteron, kiun nemalofte havas instruado de E-o – ĉu pro la cirkonstancoj (ekz. instruado al plurnacia grupo dum iu internacia aranĝo), ĉu pro la celo prepari kursanojn por estonta esperantumado. La gvidanto de la seminario en Piešťany – estrarano de ILEI kaj la entuziasm(ig)a kunordiganto de la projekto Interkulturo, Radojica PETROVIĆ – anoncis ĝian titolon kiel *Flugiloj de interkultura vento*. Mi havis bonŝancon sperti, eĉ se iomete "de ekstere", la komencojn de la projekto *Flugiloj* dum IJK-j en 2004 kaj 2005. Mi estis imponita de la dume okazinta evoluo, specife rilate al la help-materialoj, kiujn la seminarianoj povis uzi, kaj rilate al la amplekso de la seminario. Aparte menciindas *Manlibro pri instruado de Esperanto* de pluraj aŭtoroj kaj la koncizigita *Detala gramatiko de Esperanto* de Bertilo WENNERGREN, ambaŭ eldonitaj de E@I/ILEI. Dum la fruaj seminarioj de Flugiloj, ĉiu el aro de gvidantoj kovris sian apartan aspekton de gramatiko aŭ metodiko. Ĉi-foje la ambicio de la sola gvidanto estis profundigi en la lingvostrukturon de E-o kaj en ĝiajn didaktikajn aspektojn, enkonduki la seminarianojn al diversaj instrumentoj, interesi ilin pri interkultura edukado kaj eĉ lasi spacon al praktikaj ekzercoj pri lecion-planado kaj instruado.

Ankaŭ evoluis kaj kreskis intereso pri la seminario. Komence *Flugiloj* enpoziciigis sin kiel seminario por junaj instruemuloj kaj instruantoj de E-o. Kun la maturiĝo de la seminario mem, aĝe plivastiĝis ankaŭ ĝia celgrupo. Flugilojn en Piešťany ĉeestis homoj de diversaj aĝoj kaj kun diversaj instruspertoj kaj celoj. Iu estis sperta lingvoinstruisto de la angla, kiu nur antaŭ nelonge ekinstruis E-on. Iu instruis E-on dum iom da jaroj, sed volis ekkoni aliajn metodojn kaj pliprofesiigi sian laboron. Iu estis aspiranta dividi sian entuziasmon pri E-o kun novaj homoj – kiel plentempa profesiokupo. Iuj jam faris unuajn provojn instrui E-on, iuj bezonis kuraĝigon por realigi tiun sian strebon. Sed ĝenerale la atendoj de la seminarianoj temis pri plievoluigo kaj plialtigo de siaj instrukapabloj. Inter la atendoj de la kursgvidanto mem eblis diveni la esperon instigi intereson al la projekto *Interkulturo* kaj trovi novajn kunlaborantojn kaj surlokajn kunordigantojn, por lanĉi novan fazon de la projekto.

Komence de la seminario oni ricevis prezenton de mallongaj historioj de la *Flugiloj* mem kaj de la projekto *Interkulturo*. Post tiu enkonduko, la unua granda parto de la unusemajna programo estis dediĉita al la lingvostrukturo de E-o. Kovrante ĝin oni ankaŭ atentigis kaj diskutis pri malpli facilaj aspektoj de la gramatiko kaj aparte dediĉis tempon por trovi plej klarajn kaj trafajn manierojn instrui ilin, laŭ didaktika vidpunkto. Sekva parto celis prezenti al la seminarianoj efektivajn kursojn ĉe diversaj niveloj, okazantaj paralele kadre de SES. Kune la partoprenantoj vizitis lecionojn, observis, notis kaj poste diskutis ene de sia grupo tion, kion ili spertis. Tiu sperto tre utilis por ili, kiam venis la tempo por praktika kaj kuraĝiga tasko, nome: fari planon de provleciono por iu certa nivelo kaj provinstrui ĝin, apud la "vera" instruisto, ĉe iu el la kursoj de SES. Por la sukceso de tiu lasta parto oni aparte danku pro la kunlaboremo kaj malfermeco la ĉeestantajn instruistojn: Stano MARČEK (Slovakio), Dalia PILECKIENĖ (Litovio), Petra SMIDÉLIUSZ (Hungario) kaj Márta KOVÁCS (Hungario).

Por distingi inter tiuj niveloj kaj por klare enpoziciigi siajn estontajn kursojn, la partoprenantoj konatiĝis kun la *Komuna Eŭropa Referenckadro*. Ĝi priskribas kaj helpas taksu lingvosciajn kompetentojn en diversaj kategorioj, kiel aŭskultado, parolado, legado ktp. La *Komuna Eŭropa Referenckadro* estas nuntempe unu el la plej rekonataj lingvosciaj klasifikoj ne nur en Eŭropo, sed en la mondo ĝenerale, kaj certe indus por instruistoj de E-o koni ĝin kaj apliki ĝin en siaj kursplanado kaj testado.

El la supre priskribita plano oni povas vidi kiel dum la tuta seminario la gvidanto strebis evoluigi tri gravajn kompetentojn de ajna instruisto de E-o: lingvan, interkulturan kaj strategian. Tiu ĉi strategio ŝajnis sukcesi kaj helpi al la partoprenantoj atingi siajn celojn. Ni lasu la vorton al ili:

La kurso por mi estis tre instiga - kaj la gramatika parto, kaj la metodika. Mi eksciis kiel oni povas instrui pri interkulturaj rilatoj, kial ili estas gravaj. – *Maria Minichová, Slovakio*

Mi ricevis multe da ideoj, kiamaniere mi povus helpi en mia klubo, kiel vigligi instruadon. – *Milada Kolářová, Ĉeĥio*

Mi ĝojis ekscii novajn instru-ludojn. Mi ege bonvenigis la eblon praktike sperti la instruadon en la grupoj kaj observi la laboron de la instruistoj kaj instruantoj. – *Magdaléna Feifířová, Slovakio*

Mi volas membriĝi al ILEI por pli bone disvastigi E-on en Nankino kaj Ĉinujo. Mi volas partopreni en pli da programoj pri manieroj krei pli da instruistoj, pli bone instrui E-on. – *Ian Abram Clark, Ĉinio/Usono*

Tiu ĉi lasta citaĵo donas esperon, ke eĉ malgraŭ malfacilaj ventoj, la seminario kiel Flugiloj pluvivos kaj bonfartos, kaj ke estonte ĝiaj flugiloj ne nur ĉirkaŭpremos pli da partoprenantoj, sed ankaŭ akiros pliajn novajn gvidantojn laŭ la bone establita ekzemplo. Jam en la semajno post la *Flugiloj* en Slovakio Radojica Petrović kun grupo de kunlaborantoj gvidis similan seminarion en Kubo dum la 43-a konferenco de ILEI. Oni priparolas nun eblojn okazigi ĝin ankaŭ en Nord-Ameriko kaj en Ĉinio. Espereble tiu evoluo helpos instigi ankaŭ novajn interkulturajn gvidantojn, certe kadre de la projekto *Interkulturo*.

Ni semas kaj semas... ĉe la fruktodonaj bordoj de la rivero Kanimaro

de *Ivan EIDT COLLING* (“Ivanĉjo”, Brazilo), <iecolling@yahoo.com.br>

Tie ĉi mi prezentas impresraporton pri la ILEI-Seminario *Flugiloj de interkultura vento*, okazinta en Matanso (Matanzas), Kubo, de la 12-a ĝis la 16-a de julio, en Hotelo Kanimao, belega loko apud la rivero Kanimaro (Canimar). Mia edzino Rita kaj mi partoprenis en la Seminario de la dua

tago. Tie estis dudek du homoj, divers-aĝaj, sed plejparte junuloj el pluraj landoj, ĉefe el Latinameriko, plejparte denaskaj hispanparolantoj. (Unu demando: kial ne estis kubanoj inter la seminarianoj?)

La Seminario okazis sub la kompetenta gvido de Radojica Petrović (“Rade”), kun fojaj partoprenoj de aliaj prelegantoj. Tri kampoj estis enfokusigataj: metodologio de instruado, gramatiko de E-o kaj primovadaj demandoj. Radojica gvidis debatojn kaj ekzercojn pri gramatikaj punktoj, interplektatajn kun instrucelaj demandoj: akuzativo, participoj, refleksivo, prepozicioj, vortfinaĵoj (morfologio kaj semantiko), fonetiko kaj fonologio. Ankaŭ la interkulturaj ludoj kaj paroligaj ekzercoj okazis sub lia gvido. Specifaj metodologiaj konsiloj estis prezentataj de Julián Hernández Angulo (lecionplanado) kaj Stefan MacGill (distingo inter “formala” kaj “didaktika” gramatikoj), kaj primovadajn demandojn traktis Martin Schäffer (rilato kun ĵurnalistoj kaj amaskomunikiloj, organizado de E-kursoj), Boris Legault (interreta agado) kaj Łukasz Żebrowski (junulara agado).

En la interkulturaj ludoj, unu el la aktivadoj estis duopaj konversacioj pri “la spaco, en kiu mi sentas min plej agrable”, en kiu ni uzis parolan kaj perbildan komunikadon. Pli longdaŭra interkultura ludo, kiu okazis dum pluraj lecionoj, konsistis el diskutoj pri kvar temoj, laŭ la vidpunkto de niaj kulturoj, de niaj regionoj, landoj, kaj ankaŭ de aliaj kulturoj/landoj, pri kiuj ni havas konojn.: a) loĝeja komforto; b) donacoj; c) familiaj festoj; ĉ) ofendoj kaj ofendiĝoj.

ILEI ankaŭ organizis la Lingvan Festivalon en Matanso, kiu montriĝis tre efika aranĝo por kontaktigi lokanojn kun esperantistoj kaj ligi E-on kun la ideo de lingva diverseco kaj protekto de tiu diverseco. Estas mirinde, ke tiel simple oni povas okazigi eventon, en kiu oni prezentas buntan mozaikon: estis 20 prezentoj, el inter ili: “indiĝenaj lingvoj de Meksiko” kaj “variantoj de la hispana lingvo en Ameriko”. (Plia disvastigado de la aranĝo tamen estus dezirinda - pri tio plendis angolanino, kiu studas en la Universitato de Matanso.) Mi demandas min, kial oni ne organizas similan eventon por la ekstera komunumo dum la UK...

Kiaj impresoj restas post la Seminario? Mi provas respondi al tiu demando ne nur surbaze de spertoj miaj kaj de Rita, sed ankaŭ de la respondoj de partoprenantoj al demandaro kaj de kelkaj personaj babiladoj. Mi prezentas unue malbonajn aspektojn, por ke mi povu fini la raporton per la bonaj!

Unue, estis organizaj problemoj. Ne estis taŭga loko por komunaj dumtagaj prezentoj (Seminario + Konferenco), do tio iom malhelpis la integriĝon de

ambaŭ grupoj. Alia organiza problemo rilatis al malfruoj, kiuj fariĝis sistemaj (grandparte pro la hotelaj servoj). Cetere por vegetaranoj mankis elektebloj – ne nur en Matanso, sed ankaŭ poste en Havano.

Alia ĝenerala plendo estis, ke ni ne havis sufiĉe da tempo por plenumi la taskojn. La aktivadoj finiĝis nokte, je la 22-a horo, kaj por la sekva tago ni devis ankoraŭ fini ekzercon aŭ tekston, pri kiuj ni ne povis adekvate longe mediti kaj pripensi.



Ivan EIDT COLLING (BR) ricevas sian diplomon de Radojica PETROVIĆ (RS)

Eble disponigo de komputiloj kaj interretaliro povus faciligi la laboron. Mi sugestus uzi tiujn rimedojn, ekzemple, kiam oni diskutas pri afiŝoj. Jen sugesto eble por ILEI, aŭ por *edukado.net*: ke oni havu en iu retejo specon de banko de afiŝoj, flugfolioj, faldofolioj el la tuta mondo (kun disponigo de Esperanta traduko de nacilingvaj tekstoj, kaj se eble prikomentitaj). Tio povus esti bonega bazo por ekhavi novajn ideojn.

Mankis pliprofundigo de la temoj. La programo estis tro vasta, kaj ankaŭ pro la jam aludita tempomanko, oni devis haste flug-rigardi kelkajn punktojn. Multaj geseminarianoj plendis, ke oni ne kontrolis la ekzercojn –

kaj multaj el ili ne sentas sin komforte pri specifaj gramatikaj punktoj. Aldone, ne estis provlecionoj – kvankam por kelkaj el ni la Lingva Festivalo konsistigis la provlecionojn.

Do, estis multe da aktivado, multaj bonegaj proponoj, multaj ideoj, sed multaj proponoj restis en la aero, senkonkludaj aŭ, kiel diris unu el la anoj, “la temoj ne finiĝis sate”. Eble cel-limigo estus konsilinda, por pli bona efektivigo de la taskoj.

Kun tiom da hispanparolantaj geseminarianoj, preskaŭ neeviteble okazis krokodilado, pri kiu oni ankaŭ plendis. Oni eĉ levis la demandon, ĉu por estontaj okazoj tiu modelo, kun forta ĉeesto de samlingvanoj, estas la plej bona ideo (tio krome iom malfaciligis la interkulturajn ludojn). Eble estus konsilinde venigi pli da alilingvanoj el aliaj kontinentoj, aŭ el Ameriko.

Kaptis mian atenton la fakto, ke tie multaj homoj uzadis la konstruojn “peti al iu / demandi al iu”, anstataŭ la normajn “peti iun / demandi iun” aŭ “peti de iu / demandi de iu”. Tio estis por mi atentoveka, ĉar mi estas insistema ĉe miaj gelernantoj kaj ĉe la anoj de nia Asocio pri tiu detalo.

La Seminario estis bonega aranĝo. Bonvolu kompreni, ke mi registras la suprajn aspektojn kaj sugestojn, por ke oni sciu, kion oni ankoraŭ povas plibonigi por pli efike uzi la homfortojn, kiuj kunestas dum unu semajno por specifa porinstruista trejnado. Entuziasmo ne mankis, en ambaŭ flankoj. Ekzemple, oni multe laŭdis Julián pro lia entuziasmo kaj praktika aliro al la temo.

La Seminario ebligis al ni interkonatiĝon kun multaj homoj, kaj ni povis interŝanĝi informojn pri la movado, pri gramatiko, pri instruado kaj pri spertoj, malfacilaĵoj, ideoj, agadplanoj el pluraj lokoj. Multajn konojn ni ricevis, kaj miaflanke specife mi substrekas la metodologiajn konsilojn kaj organizadon de kulturaj ludoj. Multaj sugestoj (ankaŭ el la *Tago de la Lernejo* en la UK) estas simplaj, efikaj, facile aplikeblaj, kaj mi provos ekuzi ilin tuj, en la komenciĝanta monatseso. Librooj kaj lumdiskoj estis indikitaj kaj aĉetitaj, materialoj estis disdonitaj, niaj retoj de kontaktoj pligrandiĝis... ankoraŭ dumlonge ni devos digesti ĉion! Mi pensas ke, por ni ĉiuj, tiu semajno en Matanso estas neforgesebla, ĝi por ĉiam restos en niaj koroj: pro la sindediĉo, lingvokono, kompetenteco de la prelegintoj kaj de la ĉefgvidinto, pro la etoso de amikeco, frateco, pro la beleco de la loko, pro la kunĝuo de nia belega lingvo. La vorto “Seminario” devenas de la latina, kaj koncernas semadon; ĉe la fruktodona bordo de Kanimaro ŝosoĵ jam ekaperis, kaj se ni bone akvumos ilin, baldaŭ ni kolektos fruktojn!

Nome de la geseminarianoj mi esprimas korajn dankojn al Radojica, Martin, Boris, Stefan, Julián, Łukasz, Ana Montesinos, al ILEI kaj al la kubaj geamikoj, kiuj ebligis al ni tiujn neforgeseblajn spertojn! (Mi tie ĉi registras specialan dankon al Marta Alonso Gutiérrez, kies interveno akcelis la revenon de niaj valizoj, malaperintaj dum dek unu tagoj ...)

ILEI aktivis dum la UK

*Raportoj de **Stefan MACGILL**, Prezidanto de ILEI*

ILEI komence de la UK

Kadre de la laŭdinde konciza du-hora Solena Inaŭguro de la Universala Kongreso, la prezidanto de ILEI havis salut-eblon, kaj uzis la lastajn el siaj tri minutoj por komuniki la kernan mesaĝon de ILEI kaj UEA kaj de la movado pri iliaj respektivaj roloj en la kunlaborado. Jen transskribo de la saluto de ILEI, kiel eldirita de Stefan MacGill: "ILEI salutas la 95an Universalan Kongreson! Ĝi ĝojas raporti pri la ĵus finiĝinta bonetosa 43a Konferenco de ILEI en Matanzas kun pli ol 60 partoprenintoj - inter kiuj deko da kolegoj el Kubo - tiel ke la aranĝo estas la plej granda de ILEI ĝis nun en Latinameriko, kaj inter la plej grandaj el ĝiaj ekstereŭropaj eventoj. Rimarkinda paralela programo estis seminario pri instruista trejnado, en kiu partoprenis 22 plejparte junaj, entuziasmaj kaj lernemaj instruistoj (aŭ instruostoj), kiuj povos fariĝi movadaj motoroj en siaj landoj – ekzemple en Argentino, Bolivio, Brazilo, Dominika Resp., Haitio, Meksiko, Nikaragvo kaj Urugvajo. ILEI tenos proksimajn rilatojn kun tiuj kursanoj, tiel ke ĝi levu sian profilon en ĉi tiu kontinento."

Sekvis invito al la tujsekva kunsido de ILEI kaj por la Tago de la Lernejo en mardo. La saluto pluiris jene: "Mi kuraĝas aserti, ke la rilatoj inter UEA kaj ILEI en la lasta jaro intensiĝis kaj pliboniĝis. Feliĉe la nuna finverkata Strategia Plano de UEA tenas en fokuso la centran rolon de edukado. Ĝi salutinde ĉi-foje ne nur difinas ĉefcelojn, sed aldone aliras la demandojn, kiel ligi agadojn, agantojn kaj rimedojn al la plenumo de tiuj prioritataj celoj. ILEI plektiĝos en la polurado de tiu Plano, specife pri la altigo de la kvalito kaj kvanto de E-instruado; en tio klare la misio de ILEI estas alporti la fakan kontribuon al la procezo, sed – jen la unu kerna mesaĝo de ĉi tiu saluto – la livero de la pluse bezonataj organizaj kaj financaj fortoj estas

afero de la tuta movado – do ni (ILEI), ili (UEA) kaj vi ... finfine de ni ĉiuj! Per tiuj pensoj mi fermas la saluton, bondezirante sukcesan kaj produktivan kongreson."

Poste okazis faka kunsido de ILEI, kiu arigis kvardekon da homoj (plejparte ILEI-anoj), kiuj kolektiĝis sur la podio de la enorma salono Zamenhof. Ili aŭdis raportojn pri la konferenco, la seminario, Lingva Festivalo kaj Tago de la Lernejo. Ili starigis demandojn pri la Ligo, ĝiaj novaj libroj (Detala gramatiko de Esperanto, de Bertilo Wennergren), pri la ekzamenoj kaj ceteraj temoj. Vespere de la Internacia Kongresa Universitato, la prelego de ILEI-vicprezidanto Duncan Charters estis – pro lia maleblo ĉeesti – legita de la prezidanto de ILEI. ILEI partoprenis en la Movada Foiro interkonvespere, kaj jam starigis sian budon.

Sume, okazis plena semajno da engaĝiĝo de ILEI Ni uzis ĉiujn eblajn forumojn por detali ĝuste, kiel la movado kontribuu al la fortigo de nia instruista agado.

Riĉa, densa programo – ILEI inde prezentis sin

Tago de la Lernejo

La Tago de la Lernejo okazis sukcese en mardo, 20 julio, kadre de la 95a Universala Kongreso en Havano. Dek ses prezentaĵoj kovris tutmondan gamon en ses-hora sesio, kiu pro la programa riĉo kaj denso entenis nur unu dek-minutan paŭzon. Sub la temo 'La plezuro de lernado kaj instruado' la tago disvolviĝis laŭ tri subtemoj: Ludoj, Instruado kaj Projektoj.

Sub 'Ludoj' parolis pri rolludoj Stefan MacGill, pri interkulturaj ludoj Radojica Petrović kaj pri kartludo por instrui lingvan diversecon François Lo Jacomo.

Sub 'Instruado' Renato Corsetti parolis pri la rolo de legado, Josef Šemer pri instru-ekzercoj, Julián Hernández pri paroligspronaj ekzercoj, Stano Marček pri rektmetodaj instruiloj, Gonzalo Collantes pri instruspertoj en Brazilo kaj Kubo, Hori Yasuo el Japanio pri Esperanto-Sumoo, kaj Hector Jiménez Batista pri lingva talento kaj profesia kompetenteco. Finis la temblokon Sylvain Lelarge pri senseĝa instruado [*vd la foton sur p. 43*], kiu efektive elseĝigis la sepdekon da tiumomente partoprenantaj homoj. Pro tio la korelativa danco traĵiros la mondon.



Aŭrora BUTE kaj Stefan MACGILL prezidas dum Tago de la Lernejo

En la sekcio 'Projektoj', Katalin Kováts raportis evoluojn ĉe *edukado.net*, Jenny Bishop pri aŭstralia projekto, Geoffrey Greatrex pri la brita projekto Springboard kaj Elizabeth Barbay pri FRINGOJ. Oni disdonis diplomojn al la kursanoj el la instruisto-trejna seminario dum la 43a Konferenco de ILEI.

Tutmondigo kernas inter la aspiroj de ILEI – memoru ke el la lastaj kvar konferencoj, unu okazis en Azio (Japanio), unu en Afriko (Benino) unu en Ameriko (Kubo) kaj unu en Eŭropo (Pollando). Jen kiel la Tago de la Lernejo tuŝis ĉiujn kontinentojn: pere de bildoj kaj paroloj de Radojica Petrović, ni vizitis Afrikon, pli specife la kurson kaj seminarion en Kinŝaso meze de 2009. Klarigo pri Esperanto-Sumoo de Hori Yasuo kaj prezento de Josef Ŝemer vizitigis nin al Azio, pluraj kubaj kontribuantoj montris kiel intense en ĉi tiu lando oni okupiĝas pri la instruado; tiel reprezentiĝis Ameriko. Prezentaĵo de Jennifer Bishop pri fremdlingvaj programoj en Aŭstralio kompletigis la kvinkontinentan buntecon. La plena programo aperis en la kuriero (Havana Karavano) en la tago antaŭ la evento. Malmultaj homoj restis tra ĉiuj ses horoj, pro amaso da konkurencaj programoj - do la tago estis iusepca bazaro kun kontinuaj alvenoj kaj foriroj - en la pintaj momentoj la ĉambro plenis per pli ol okdek aŭskultantoj, kaj neniam la nombro falis sub 40. La tagon modele preparis

kaj surloke realigis Aurora Bute el Rumanio, tiel ke precize je la kvara horo ni povis fermi la aranĝon, ellasinte neniun anonceton. La tagon komence salutis la vic-prezidanto de UEA, Claude Nourmont, kaj la prezidanto de la LKK de la UK (cetere estrarano de ILEI), Julián Hernández Angulo; komence kaj fine salutis la prezidanto de ILEI, sed la lasta vorto apartenis al la prezidanto de UEA, Probal Dasgupta.

Rekomendoj de Eduka subkomisiono – komitato (UEA)

La subkomitato pri edukado en la 95a Universala Kongreso kunvenigis 21 personojn el 16 landoj, inter kiuj 10 estis komitatanoj. Tiel ĝi estis la plej populara el ĉiuj subkomitatoj. La kunsidon prezidis Stefan MacGill. La sekvaj rekomendoj estis akceptitaj senmodife de la tuta Komitato de UEA en ĝia vendreda kunsido:

- 1) Rekomendas al la Komitato akcepti la reviziitan interkonsenton inter UEA kaj ILEI, kiu estas jam akceptita de ambaŭ estraroj.¹
- 2) UEA kaj ILEI dediĉu rimedojn al postsekvado de la sukcesa komuna trejnseminario en Matanzas, tiel, ke floru kursoj kaj eduka fortiĝo tra la Latina Ameriko.
- 3) Ĝi alvokas al pli forta diskonigo de la eŭropkonformaj (KER) ekzamenoj kaj starigo de ebloj alirigi ilin al kandidatoj en plej diversaj mondopartoj.²
- 4) La komitato taksas esenca, ke ILEI aktive partoprenu en la finpretigo de la *Strategia Plano (2011-2020)*, specife pri ĝiaj edukaj aspektoj kaj alvokas al ILEI liveri ĝis Kopenhago 3-5-jaran subplanon kun edukaj projektoj kaj la bezonataj homfortoj.
- 5) La subkomitato vokas al kursgvidantoj enplekti en siajn instruplanojn aktivaĵojn pri la laboro de Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, Unicef ktp., ekz. eldonante sciencajn materialojn kunlabore kun ISAE.
- 6) Ĝi rekomendas daŭrigon de la afrika agado laŭ la skemo sukcese uzata tra la lastaj jaroj sub la devizo de la elformata *Strategia Plano* de UEA: "Konsciigo pri Lingvoj kaj Kulturoj".
- 7) Ĝi instigas la Kongresan Fakon de UEA oferti al ILEI subtenon kaj konsilojn por eventuala okazigo de ILEI-Konferenco en atingebla de la UK en Hanojo (2012) kaj rekomendas, ke en la jaroj 2010-2011 okazu preparoj

¹ Pro tempomanko, tio tamen ne okazis.

² La kongresa sesio altiris 37 kandidatojn.

por trejnseminario en Azio, organizota de UEA/KAEM kaj ILEI kune - laŭ la formulo sukcese uzita ĉi-jare.³

Tiu akceptita dokumento ligas la Komitaton de UEA pli proksime kun la pluirantaj projektoj de ILEI kaj la kunlaborado de UEA kaj ILEI.

ILEI en la Komitato de UEA

ILEI havas A-komitatanon ĉe UEA, kun nova nomito. Tiu konstatis, ke komitatkunsidoj ĉe ILEI kaj UEA forte malsamas - kaj etose kaj procede. Frua surprizego estis la manko de elekto por nova estraro, eĉ kun pli da kandidatoj ol lokoj. Temas pri konfirmo de antaŭredaktita listo anstataŭ vera elekto. Tio okazis akorde kun la elekto-regularo por 'certigi koheran teamon'. Grupeto de ŝokitaj komitatanoj – inter ili la ILEI-prezidanto, jam verkis modifproponon por la regularo (videbla en nia hejmpaĝo) por transformi tiun eksepokan koncepton al io simila al tio, kio jam de multaj jaroj – eble eĉ dekomence – bone funkcias en nia ligo.

La sub-komitato pri instruado altiris 21 personojn – la plej granda el tiaj kunsidoj. Ĝi pretigis utilan faskon de rekomendoj (vidu aliloke), kiujn la plena komitato poste akceptis.

Konforme kun nia liga sinteno pri dediĉo de realaj rimedoj al la movadaj ĉefceloj, ILEI aldoniĝis al iniciato de aliaj 'samideanoj', pledante por ebloj modifi prioritatojn en la buĝetada procezo de UEA. Konkreta propono de la sub-komitato pri financoj modifi buĝet-proponon 2011 iel malaperis inter ilia kunsido kaj ĝia vendreda prezento. Klopodetoj relevi la temon ricevis reagon de la Direktoro de la CO, kiu aplikis malakcepteblan epiteton al ĉiuj strebantoj je ŝanĝo, pri kiu la prezidanto aŭ estraro devintus interveni. Tiu nekontestita epiteto devigis al ILEI esprimi sindetenon ĉe la buĝeta voĉdono kaj aldoni al la protokolo motivadon por tiu voĉdono. Komitatanoj kaj funkciuloj de ILEI estas informitaj pri tio – detaloj troviĝas en nia hejmpaĝo.

La aktivado de ILEI en la UK estis ĝenerale pozitiva kaj utila, sed ĉe la komitato la bilanco estis okulfrape miksitita.

Stefan MacGill
Prezidanto, ILEI

³ KAEM estas la Azia Komisiono de UEA.

Tre sukcesaj someraj sesioj en la KER-ekzamenoj

Dum julio 2010 en tri diversaj landoj (Slovakio-Usono kaj Kubo) okazis du ekzamensesioj kun entute 84 kandidatoj. La aranĝoj SES (Somera E-Studado) en Piešťany (Slovakio), renkontiĝo de lernu-anoj kaj NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro) en la universitato de San-Diego (Usono) gastigis la 12an sesion de la nova ekzamensistemo.

Danke al la zorga kaj aktiva antaŭpreparo kaj la multnombra parto-prenantaro de la eŭropunia Grundtvig-projekto, dum la ĝemelsesio la ekzamenojn trapasis entute 48 personoj el 13 landoj, je unu pli ol en la sesio dum la UK en Bjalistoko.

En Slovakio ekzameniĝis: 35 personoj, 11 sur nivelo B1, 10 sur nivelo B2 kaj 14 sur nivelo C1. La kandidatoj venis el 10 landoj: 21 el Pollando, 4 el Slovakio, 2 el Hispanio, 2 el Nederlando, po 1 el Britio, Danio, Germanio, Rumanio, Rusio, Svedio. En Usono, San Diego ekzameniĝis 13 kandidatoj, 11 personoj el Usono, po 1 el Meksiko kaj Kanado. La plej populara nivelo estis C1 kun 10 kandidatoj. Sur nivelo B1 ekzameniĝis 2, sur nivelo B2 unu persono. En NASK estis interese, ke decidis akiri ekzamenspertojn ankaŭ pluraj el la gvidantoj de la kursaro. La komuna ekzameniĝo de profesoroj kaj studentoj donis prestiĝon por la ekzamensistemo.



La 13a ekzamensesio okazis dum la UK en Havano [vd la foton sur p.21]. Tiun sesion trapasis 36 kandidatoj, el 11 landoj (Aŭstralio, Brazilo, Ĉilio, Francio, Germanio, Italio, Meksiko, Rusio, Svedio, Urugvajo kaj Usono), inter ili 10 kubanoj, kies ekzameniĝon ebligis sindonema subvenciado de 10 esperantistoj, membroj de *edukado.net* kaj kelkaj akademianoj. Sur nivelo B1 ni havis 7 kandidatojn, sur B2 ekzameniĝis 18 kaj sur la plej alta nivelo C1 mezuriĝis 11 personoj.

Nepre laŭdendas la sindonemo de tiuj kandidatoj, kiuj meze de dumkongresa riĉa programaro en ekzotika lando kaj ankaŭ interne plena “strandvetero”, dediĉis plurajn horojn por konfrontiĝi kun la defiaj taskoj kaj akiri ateston pri siaj lingvaj konoj. Specialan intereson pri ekzamen-diplomoj havis ĉefe studentoj kaj instruistoj, kiuj per ŝtate agnoskata atestilo povas havi avantaĝojn en stud- kaj labormedioj, kaj per tio faras gravajn lingvopolitikajn paŝojn por la oficialigo kaj akceptigo de E-o.

Kun la rezultoj de la unuaj du someraj sesioj la sumo de la ĝisnunaj ekzamenokazoj estas 222 (B1/41, B2/57 kaj C1/124), kies kandidatoj venis el 37 landoj. Bonvolu vidi ĉi-sube la plej diligentajn naciojn.

Francoj	33	6	6	21
Poloj	28	8	7	13
Germanoj	26	5	6	15
Brazilanoj	19	6	6	7
Usonanoj	13	3	1	9
Nederlandanoj	11	0	1	10
Kubanoj	10	1	8	1
Kiuj?	Sume	B1	B2	C1

Tiu statistiko ŝajnas forte ŝanĝiĝi en la lasta somera sesio, okazigota dum la itala kongreso fine de aŭgusto, por kiu ni jam havas 18 kandidatojn, inter kiuj pli ol 10 italojn. Pliaj sesioj okazos oktobre en Herzberg (DE) kaj Indonezio, decembre en la jarfinaj aranĝoj NR kaj IF en Germanio.⁴

⁴ Al tiuj ĉi sesioj eblos aliĝi rete ĉe katalin@ikso.net aŭ surloke dum la aranĝoj.



La parola ekzameno de Gilda Muñoz Bonilla (Meksiko) en San Diego

La belaj rezultoj neniam estus atingeblaj sen la sindediĉa laboro de la ekzamena komisiono de UEA, Zsófia Kóródy, Renato Corsetti kaj Katalin Kováts, kiujn helpis en la okazigo de la someraj ekzamenoj Márta Kovács, Petra Smidéliusz, Peter Zilvar, Duncan Charters, Josias Barboza, Paŭlo Nascentes kaj Sylvain Lelarge.

Dankas ĉiujn pro la helpo kaj gratulas la ekzameniĝitojn:

Katalin KOVÁTS, gvidanto de la ekzamenkomisiono de UEA

Kongreso de la Komisiono pri Azia E-Movado de UEA (KAEM), Ulan Batoro, Mongolio, 18-23 junio 2010

de Mireille GROSJEAN („Mirejo”, Svislando)

Ĉirkaŭ ducent personoj kunvenis en Mongolio en mirinda sunoplana lando.

La organizo de la konferenco estis tre bone farita. Ĉio iris glate. Bunta programo kun koncertoj kaj dancoj ĝojigis la kunvenantojn, kiuj venis el Israelo, el Japanio kaj el diversaj landoj inter tiuj du finoj de la azia

kontinento. Kompreneble ankaŭ kelkaj ne-azianoj kaptis la okazon por malkovri Mongolion.

Okazis diversaj prelegoj kaj kunvenoj, inter ili kunveno de geinstruistoj. Tie la temo estis ILEI kaj ĉiuj povis samopinii kaj ĝoji pri la efika laboro de la nova estraro.

Japanaj samideanoj anoncis, ke ili tradukis “Malkovru Esperanton” al la japana.

En Koreio la temo de la nacia kongreso estas: “Metodo de instruado”. Tio montras, ke Koreio dediĉas grandan atenton al instruado.

Mirejo: Unue la bazo, la unua paŝo estas informado. Poste venas instruado. Por tiu fazo geinstruistoj devas esti pretaj. Ni ĉiuj devas prepariĝi, konstante plibonigante nian lingvonivelon, konstante ekzercante nin en la instruado.

Korea partoprenanto petas, ke ILEI preparu didaktikan dokumenton kun paŝoj por instruistoj. Mirejo diras, ke tio jam ekzistas en pluraj metodoj kaj en “Manlibro pri instruado” kaj ĉe *edukado.net*. Plie ŝi aldonas, ke metodo estas same kiel ganto por homo, kiu instruas; ofte iu paŝo bona por iu instruisto eble ne taŭgas por alia instruisto. Povas esti ankaŭ, ke metodo, didaktiko ne taŭgas, ĉar la celpubliko ne samas. Oni devas daŭre adaptiĝi. Iu sperta instruisto povas doni ideojn, sugestojn. Tamen ĉiu instruisto devas eltrovi la metodon, kiu taŭgas por li/ŝi. Interŝanĝo de spertoj estas tre valora paŝo al plena posedo.

Pluraj azianoj deziras, ke ILEI dediĉu pli da atento al Azio. Kompreneble azianoj ofte mem kulpas. Sed: oni ofte nenion povas legi pri Azio en IPR. Ne estas azianoj en la estraro. Ĉu ILEI forgesas Azion? Tiu aspekto devas ŝanĝiĝi. Aŭdiĝis peto al la redaktoro de IPR: li devas peti, eĉ postuli raportojn el aziaj landoj, se tiaj raportoj mankas, ne venas.

Alia tre grava rimarko: Azianoj ellaboru propran manieron kunlabori.

Decido: okazos komuna seminario por instruistoj el Koreio, Ĉinio, Japanio.

Nova komitato de la Komisiono KAEM elektiĝis. La prezidinto s-ro Lee Jungkee ricevis aplaŭdojn kaj dankojn. La nova prezidanto estas profesoro Sasaki el Japanio.

Rimarkoj de Mirejo: Oni povas konstati, ke Koreio, Japanio kaj Ĉinio estas fortaj landoj kun granda sperto. Aliaj landoj ne aperis en la kunsido pri ILEI. Tamen estas sekcioj aŭ reprezentantoj en Irano, Barato, Rusio,



Mirejo kaj LIU Baoguo en Ulan Batoro

Armenio, Uzbekio. Neniu el ili partoprenis; do ni ne povis aŭdi ion pri la instruado en tiuj landoj. La intenco pri kunlaboro inter la tri orientaziaj landoj estas bonega ideo. Espereble ĝi efektiviĝos. Povus esti inter aliaj datoj dum la restado de Mirejo en Japanio inter la unua de majo 2012 kaj la UK en Hanojo.

El la landoj kaj sekcioj...

Ĉinio

Seminario de la Ĉina Sekcio de ILEI, Taiyuan 2010

La seminario okazis de la 1-a ĝis la 11-a de aŭgusto en la urbo Taiyuan, Shanxi-provinco, norda Ĉinio. Aliĝis 59 personoj: 51 kolegoj el 20 ĉinaj urboj, 6 kolegoj el aliaj landoj (Danlando kaj Suda Koreio po 1, Usono kaj

Japanio po 2), plus 2 personoj, kiuj ne povis fizike partopreni en la seminario sed pagis kotizon.

La programo de la seminario estis riĉa, abunda kaj bonkvalita. Entute okazis 13 prelegoj (inkl. de reta prelego pere de Skajpo) pri edukado, metodoj de E-instruado ktp., 4 raportoj pri E-instruado en ĉinaj kaj japanaj lernejoj, 2 demonstraĵoj instruadoj kaj 4 E-kursoj (2 por pli ol 25 komencintoj kaj progresantoj, 2 por 50 infanoj). Ni ankaŭ transsendis la prelegojn kaj kurs-instruadon en voĉ-ĉambro enrete. Ĉiutage pli ol 10 enlandaj esperantistoj rete ĉeestis nian seminarion.

Ni pasigis la tempon agrable ankaŭ dum la vesperaj programoj kaj ekskursoj.⁵



Grupo de infanoj dum la seminario de ILEI-Ĉinio

⁵ En IPR 2010/4 ni planas aperigi pli ampleksan raporton de Gong Xiaofeng pri la evento kaj eventuale ankaŭ prelegojn. (Vidu ankaŭ la foton sur p. 43) – NdlR

Germanio

Sukcesa projekto en baza lernejo en Berlino

De jardekoj mi estas ILEI-membro, sed ŝajne neniam mi skribis artikolon por IPR, tamen nun, ĉar mi instigis fari projekton proponitan de la profesia instruistino Heike SCHÜSSLER en baza lernejo kaj tio sukcese okazis, mi petis ŝin skribi raporton, kiun mi transsendas por publikigo en IPR. Jen la raporto de Heike:

„Ĉ. 150 infanoj de la baza lernejo BIP-Schule en Berlin-Pankow, Bizetstr. 64, en aprilo 2010 konatiĝis kun la lingvo E-o. Tio okazis kadre de la fremdlingvoj-projekto de tiu kreativeco-bazlernejo.

Dum ĉiam unu kaj duono horoj la 6-9-jaraj gelernantoj salutis unu la alian, dirante: „Saluton. Bonan tagon”. Ili ekspertiĝis kaj interese aŭskultis pri la ideo de la internacia lingvo kaj ties historio. Sekvis ritma lingvoludo, do al unuforma piedmovado ni elparolis kiel sono-resono ritme-interesajn E-vortojn:

//: Bonan tagon! ://
//: Ĉu bone dormis vi? ://
//: Jes, sed volonte pli ://
//: Hmm, kakaodoro ://
//: Hmm, bongusta pan' ://
//: Ovo, fromaĝo ://
//: Dolĉa vinbero. ://
//: Kaj eĉ ekstere ://
//: Bona vetero ://

Denove eksidinte, multaj gelernantoj miris pri la simpleco legi E-vortojn. Post la legado „fumis” la kapoj, ĉar ĉiu serĉis ĝustajn lokojn por la legitaj E-vortoj en krucenigmo.

Je la fino de la projekto unu el la unuaj klasoj bonhumore prezentis la sono-resono-ludon sur la scenejo. Eĉ infanoj, kiuj antaŭ la projekto tute ne konis min, post monato ankoraŭ gaje preterpasas min kaj salutas kun bonhumoro: „Saluton. Bonan tagon” aŭ ili demandas min: „Kiel saluti en via lingvo...”
Raporto skribita permane la 20.05.2010 fare de la aŭtorino

Mi opinias, ke estus inde publikigi la "raporton" en IPR kaj por kontakto al la instruistino jen la retadreso de ŝi: froesi@snafu.de

Aldone mi volas informi pri alia sukcesa kampanjo en Berlino por enkonduki E-on en la programon de la „Popola Altlernejo – Volkshochschule” en Berlino. Fakte la E-Ligo Berlin sukcesis konvinki kaj la urbestro kaj la distrikta parlamenton de la berlina distrikto Lichtenberg ne nur doni al la sennoma parko apud la E-Kulturdomo en Lichtenberg okaze de la 150-a datreveno de la aŭtoro de E-o lian nomon, sed ankaŭ komune kun la Germana kaj Pola E-Asocioj aranĝi la Zamenhoffeston en Berlin-Lichtenberg decembre 2009. La urbestro ĉeestis la feston kaj ripetis la proponon instrui E-on en la distrikta Popolaltlernejo. La unuan fojon tiu ideo naskiĝis dum la vizito de la vicurbestro de Bjalistoko s-ano Aleksander SOSNA ĉe la urbestro kaj denove dum la Z-festo, kiu daŭris eĉ unu semajnon. Nun la 9-an de septembro 2010 okazos la E-kurso je nivelo A1 kaj februare je nivelo A2. Speciale estas interese kaj grave, ke ĉiuj dek du berlinaj popolaltlernejoj kunlaboras koncerne lingvoinstruadon kaj tiel en ĉiuj aliaj berlinaj popolaltlernejoj estos la informo, ke nun finfine eblas lerni ankaŭ E-on kadre de tiu institucio. Krome ni havas proponon fari informprelegon pri E-o en la plej granda distrikta biblioteko kaj varbi por la E-kurso.

Johann PACHTER (Germanio)

Koreio

Renkontiĝo de ILEI-Koreio

La 1-a Renkontiĝo de ILEI-Koreio okazis en la 11-a kaj 12-a de julio 2010 en la urbo Sangju, Koreio. En la renkontiĝo kolektiĝis 15 ILEI-anoj el diversaj urboj de Koreio. La evento signalis, ke ILEI-Koreio ekmovados sub nova teamo.

S-ro PARK Yong-sung parolis pri la temo 'Kiel oni kurso-gvidu sisteme?' s-ro LEE Jungkee parolis pri la temo '10 motivoj por fariĝi bona esperantisto' kaj s-ino OH Gisuk prelegis



pri 'Kurso-gvido por geknaboj' kun povopunkto per projekciilo. Post la tri prelegoj, la partoprenantoj libere diskutis kaj interŝanĝis siajn opiniojn.

ILEI-Koreio decidis, ke la renkontiĝo de ILEI-Koreio okazos jare dufoje, somere kaj vintre seminaricele. Kaj por la kunlaboro inter orientaziaj ILEI-sekcioj (Ĉinio, Japanio kaj Koreio), ILEI-Koreio proponis al la du aliaj ILEI-sekcioj tiel, ke la 1-a komuna renkontiĝo inter la tri landaj sekcioj okazu de la 12-a ĝis la 15-a de aŭgusto 2010 en la urbo Tenjin, Ĉinio.

LEE Jungkee, sekciestro

Kroatio

Pokalo Kostrena 2010

En Kroatio jam la 9-an fojon okazis tiu ĉi konkurso pri scio de E-o por lernantoj el elementaj lernejoj. Ĝin organizis la kroata ILEI-sekcio kun E-Societo Rijeka.



La konkurso daŭris tri tagojn en majo, en skolta ripozejo „Esperanto-Domo” en ĉemara urbeto apud Rijeka en Kroatio. En ĝi partoprenis dek ses gelernantoj el elementaj lernejoj; ili faris skriban ekzamenon kaj konkursis

en du kategorioj – sur komencanta kaj sur progresinta niveloj. Per „Pokalo Kostrena 2010” estas premiita la elementa lernejo „Retkovec” Zagreb, kiel la plej bona lernejo. La plej sukcesaj lernantoj (unuaj tri lokoj) estis premiitaj per diplomoj kaj pokaloj. Ĉiuj lernantoj ricevis la novan lernolibron „Esperanto – rekta metodo” de Stano MARČEK. La libron tradukis en la kroatan lingvon Marija JERKOVIĆ. Pri la amuza parto de la konkurso zorgis pliaj membroj de Kroatia Esperanto-Junulara Asocio (KEJA) el Zagrebo. La konkurson ĉeestis instruistoj kaj prelegantoj de E-o, kaj ankaŭ ĉi-jare spertoj kaj scio estis interŝanĝitaj.

Sabaton posttagmeze la partoprenantoj vizitis „Astronoman Centron Rijeka”, kie, krom la spektado de eduka filmo „Du partetoj de vitro” en la planetario, la gelernantoj aŭskultis interesan prelegon kaj spertis iom da universa grandeco tra la teleskopoj.

La sekva jaro estos jubilea. Ni festos la dekjariĝon kaj invitas ĉiujn gelernantojn kun iliaj instruistoj, ke ili venu kaj ĝuu kun ni la belaĵojn de la Adriatika maro, la bonan kroatan manĝaĵon kaj la amikecon de niaj esperantistoj. Lernu E-on kaj estu feliĉaj!

Tea RADOVANOVIĆ kaj Marija JERKOVIĆ (Fotis: Boris DI COSTANZO)

Meksiko

Komencaj fruktoj de la seminario kaj konferenco en Kubo

La unua kurso de E-o ĉe la universitato UABC en la urbo Mexicali, B.C., sukcese finiĝis. Ĉeestis, tra 60 horoj dum du semajnoj, dek studentoj, de la fakultato pri lingvo-instruado kaj tradukado kaj ili diris al mi, ke ili formas E-klubon en Mexicali.

Nun komenciĝas semestraj kursoj por du grupoj, matena kaj vespera kursoj ĉe la universitato UABC en la urbo Tijuana, B.C., por studentoj de la fakultato pri lingvo-instruado.

En ambaŭ urboj la kurso de E-o, kiu nomiĝas "Esperanto, lengua y cultura" (E-o, lingvo kaj kulturo) donas al la studentoj la samajn poentojn por ilia kariero.

La studentoj interesiĝas pri la atestilo laŭ la eŭropa referenckadro pri lingvoj kaj volas daŭrigi siajn studojn ĉe la Universitato (sur la dua nivelo),

kaj aŭtodidaktike kaj per uzo de sia nova lingvo en diverskultura etoso. La universitato akceptas kunlabori kun la E-asocioj por realigi ĉion ĉi. Mi volonte kunordigus tion, se iu asocio povus helpi.

La sekva foto fariĝis dum la lasta tago de la kurso en la UABC en Mexicali. La studentoj surprizis min kun la belaj ĉemizoj. ☺



Raportis: Gilda MUÑOZ BONILLA

Pollando

En la kadro de la Partnera Projekto „Lernado dum la tuta vivo” de la GRUNDTVIG-programo 2009-2011 (subtenata de la Eŭropa Unio kaj organizita de PEA, E@I kaj ICH kun la partopreno de *edukado.net* kaj ILEI), Katalin KOVÁTS, redaktoro de *edukado.net*, gvidis tutsemajnan intensan programon inter la 22a kaj 29a de majo 2010 por entute 28 polaj kaj slovakaj partoprenantoj de la projekto [vd la foton sur la sekva paĝo]. La programo okazis en la sudpollanda Rytro, apuda vilaĝo de Nowy Sącz, el kiu urbo devenis la triono de la grupo.

La motoro de la projekto, Halina KOMAR (prezidanto de Pola E-Asocio), lanĉis la seminarion kun la speciala celo lingve perfektigi la kursanojn kaj pretigi ilin al la KER-ekzamena sesio, okazigota dum SES en Slovakio, en kiu la grupo partoprenos kiel tria aranĝo de la projekto.

Fine de la semajno 23 personoj jam surloke aliĝis al la somera KER-ekzamensesio.⁶



Svislando

Pri nia svisa sekcio

La Svisa ILEI-Sekcio (SIS) estas tute malgranda sekcio: ĝi nombras 16 membrojn. Mirejo GROSJEAN estas ĝia prezidanto kaj Francisko RANDIN estas la sekretario. La landa asocio nomiĝas Svisa E-Societo (SES).

En Svislando okazadas lertigaj kunvenoj por lernemuloj:

- a) En lokaj kluboj (Ĝenevo, Laŭzano, Lucerno, Zuriko, Wil, Flawil)

⁶ NdIR: Valoras legi la detalan raporton kun fotoj fine de la reteja anonco: <http://www.edukado.net/anoncoj/23352>

b) En Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds.

Pri la kursoj kaj kunvenoj en lokaj kluboj raportas la revueto *Svisa Esperanto-Societo informas* (SESi). Iu vojaĝanta samideano povas rilati kun la estraro de SES por scii, kie okazas kio en Svislando. Tiucele bv uzi la retadreson ses@esperanto.ch. En CDELI agadas de jardekoj la arkivisto s-ro Claude GACOND. Li ricevas regulan helpon de s-ino Nancy FONTANNAZ.

Studsabatoj: Ili okazas en CDELI ĉiun trian sabaton de la monato krom en julio kaj aŭgusto. Ekde kelkaj monatoj respondecas pri tiuj valoregaj kunvenoj stabo de tri instruistoj: s-ino Monika MOLNÁR, s-ino Nancy FONTANNAZ, s-ro Luko ALLEMAND. Ili trio organizas klasetojn el tri niveloj. Tutkomencantoj povas veni kaj komenci la studadon de E-o. Ili estos bonege prizorgitaj de Luko. Personoj, kiuj flue parolas E-on, povos plilertiĝi sub la efika gvido de Monika. Mezuloj fluigos sian lingvo-kapablon helpate de Nancy.



Claude GACOND prelegas en CDELI, dekstre: André SANDOZ

Seminarioj: Ili okazas en CDELI la unuan sabaton de la monato krom en julio kaj aŭgusto. La horaro estas: ekde la 10a matene ĝis la 16a30 posttagmeze kun komuna manĝado en la urbo. Respondekas pri ili s-ro Claude GACOND. Prelegas dum tiuj seminarioj Claude GACOND kaj aliaj personoj el Svislando aŭ gastoj el eksterlando.

Povas okazi en CDELI aliaj eventoj, kunvenoj, laŭ la datoj kaj memorindaj faktoj. Tiel okazis en 2008 memortago pri s-ro Claude PIRON kaj en novembro 2009 celebra festo pri la 150-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.

Plie troviĝas en CDELI: giganta stoko da dokumentoj pri E-o kaj pri la aliaj planlingvoj; libroj aĉeteblaj; libroj prunteblaj; brokantaĵoj

Ĉiuj aktivaĵoj en CDELI okazadas sub la aŭspicioj de SES kaj de SIS. Por iuj demandoj pri tiu ĉi prezenta artikoleto bv skribi al la prezidanto de SIS per la retadreso mirejo.mireille@gmail.com

Mirejo GROSJEAN

Leterkesto

Letero de eksterulo – pri ebla eksperimento metodologia

Karaj Gekolegoj!

Mi ne estas ano de ajna esperantista asocio. Mi uzas E-on kiel efikan ilon – kiel ankaŭ komputilon mi uzas, sen esti membro de ia „komputilista” movado.

En mia profesio (kiel pedagogo) mi ofte vidas „komputilistojn”, kiuj pensas, ke se oni lernas per komputilo, lernado tuj iĝas moderna kaj plej rezulthava; ke projekciilo estas ĉiam pli bona ol tabulo; kaj ke la studmaterialon nur tio igas moderna, se ni povas legi ĝin sur ekrano.



Ŝajne oni volas alĝustigi la metodojn al la ilaro. Kvankam la iloj devus servi la metodojn; kaj la metodoj devas servi la lernadcelojn.

Mi instruas adoltojn. Ili venas al la kurso kun diversaj celoj de lernado. Ankaŭ iliaj antaŭaj konoj estas diversaj. Komence mi instruis informadikon: fakte multe da studentoj mi havis, kies kono pri kelkaj informadikaj fakoj estis multe pli granda ol la mia – ekzemple ĉar ili okupiĝis pri tiuj temoj jam de pluraj jaroj kaj ili venis al kurso nur por havi la kvalifikon. Mi havis ankaŭ studenton interesiĝantan pri tute aliaj temoj, li venis nur por ricevi la bazajn komputilajn konojn. Estis studento, kiu nenion alian volis ol ekzameniĝi senpene. Kaj estis multaj, kiuj investis duoblan energion por ekspliki la multegajn obstaklojn de sia lernado, ol la kvanto de la energio bezonata por la lernado mem.

Mia ĉefa surprizo estis, kiam mi vidis multe da studentoj havi problemojn pri informadik-lernado, kvankam ili evidente havis ĉiujn necesajn kapablojn kaj konojn. Librotenistoj jam vidis matematikajn formulojn, juristoj jam lernis diversajn signojn, inĝenieroj jam devis lerni la uzadon de komplikaj aparatoj – sed mi vidis ankaŭ librotenistojn, juristojn kaj inĝenierojn, kiuj panikiĝis kiam ili proksimiĝis al komputilo.

Malrapide mi divenis, ke la procezo lernada nepre enhavas mortpunktojn; kaj dependas de faktoroj emociaj, ĉu la studento pluiras aŭ konvinkas sin mem pri malsukceso.

Nuntempe mi instruas jam metodologion por estontaj pedagogoj. Mi ellaboris la metodologion „viv-tajlita lernado”⁷: ĝi estas metodologio por evoluigi studmaterialojn por memlernado kaj por helpado de la studento uzanta tiujn studmaterialojn.

Kompreneble ankaŭ mi uzas komputilon, interreton kaj ĉiujn teknikajn ilojn – kiam ili havas siajn metodologiajn rolojn.

Mia pens-procezo estas la sekva:

- Unue devas esti difinata la celo de lernado. Adolto lernas kutime por akiri kapablon: por povi fari ion, kion ŝi/li antaŭe ne povis fari (aŭ fari ion pli bone ol ŝi/li ĝin antaŭe povis fari). La celo devas esti formulita laŭ ĉi tiu vidpunkto.

⁷ Alivorte: „lernado adaptita al vivo-situacio”. Vidu: Gerő Péter: Az élethelyzethez igazított tanulás. egyetemi tankönyv, Zrínyi Miklós Nemzetvédelmi Egyetem, Budapest, 2008.; <http://www.geropeter.hu> (Esperante, angle kaj hungare)

- Poste ni devas decidi kio estu la fina mezurado. Ĉu ekzameno? Ĉu ia praktika tasko? Tio dependas de la lernadcelo: tasko de la fina mezurado estas certiĝo, ĉu la studento atingis la lernadcelon – kio alia la mezuro povus esti?
- Kiujn antaŭajn konojn ni hipotezu pri la studento komencanta lernadon? Tio estas nia decido kaj ni havas multajn eblojn; sed ni devas decidi unusence. Nia sekva tasko estas: krei komencan mezuron tiel, ke ni povu informi la „nekapablan” studenton ĝustatempe: sakstrata trafiktabulo devas esti ĉe la komenco, sed ne ĉe la fino de sakstrato. Ĝusta procedo estas, kompreneble, se ni donas konsilon: kiel la kandidato povas kompensi siajn eblajn mankojn.
- Nun ni konas jam la atendeblajn komencan kaj finan nivelojn. La breĉon devas plenigi la lernad-procedo. Do ni listigu la necesajn konojn (obeante kelkajn simplajn regulojn). Tiu listo ne dependas de la metodoj, iloj de la lernado aŭ instruado. Estas simpla faka demando ĉu iu kono necesas aŭ ne. La listo ne dependas de la studento: se oni volas esti kuracisto, elektromuntisto, bakisto aŭ ĉaspiloto, oni povas listigi la konojn necesajn por tiuj profesioj.
- Sekva tasko estas: preparado de la studmaterialo. Ĝi povas esti multspeca. Oni povas alproprigi la samajn konojn multmaniere. Aŭ per persona renkontiĝo; aŭ laborante en grupo; aŭ hejme per komputila prezentaĵo, aŭ per libro „tradicia”; aŭ pere de fizika laboro pri la prilaborenda peco. Ĉio ĉi estas influata ankaŭ de la studenta viv-situacio. Ekzistas kelkaj antaŭvideblaj situacioj: se studento vivas malproksime de la lernejo, se studento ne vidas bone, estas malsana, havas aliajn lernajn malfacilaĵojn: ĉiuj lernas alimaniere. Kaj ekzistas ankaŭ situacioj neantaŭvideblaj: adolta studento alfrontas, laŭ mia sperto, ĉiujare 8-10 situaciojn, kiam ŝi/li devas ŝanĝi sian tagordon – kaj leviĝas la demando kion prokrasti aŭ ne fari. Multe da kurso-forlasoj komenciĝas tiel. Do studmaterialo devas konsisti el partoj tiel, ke oni povu ŝanĝi ilon, tempodividon aŭ metodon eĉ dum la procezo. Pro tio ĉiu parto de studmaterialoj devas esti memstara ero, havanta sian lernadcelon, komencan kaj finan mezurojn kaj tiel plu.

- Kaj kiam ni formulas la lernmaterialon por iu aparta student-grupo, tiam ni devas decidi ĉu ni uzu multmedian (t.e. plurteknikan) aŭ tradician instruadon, bildan/sonan ilustraĵojn aŭ retmesaĝojn ktp. Multfoje influas niajn decidojn ankaŭ ekonomiaj kaj simplaj ilaraj vidpunktoj, sed la procedo de projektado estas ĉiam la sama.

Esenca ideo de la metodologio „viv-tajlita lernado” estas, ke la lernado kaj instruado estu flekseblaj en ĉiu rilato – por ne fari ian ajn cedon pri la celo de la lernado. De la kuracistoj, elektromuntistoj, bakistoj kaj ĉaspilotoj ni postulas kompletan spertecon: tiuterene kompromiso ne estas permesata, sed oni povas havi kompromisojn en ĉio alia. Eĉ dum la lernad-procedo – ja veras, ke la pli longa daŭro estas malgajno, sed tio estas malpli granda malgajno ol kursoforlasoj, ĉu ne?

„Viv-tajlita lernado” enhavas (mem)kontrolajn kaj kompensajn ciklojn, kiuj (kun cirkaŭ 10% da longigo de lernado-daŭro) preskaŭ nuligas kursoforlasojn, kaj 80% de studentoj plenumas super 80% (anstataŭ la kutimaj 35-40% de la publika instruado).

Kial mi skribis ĉion ĉi? Ĉu por fanfaroni pri miaj rezultoj...? Nu, unuavice ne pro tio...

Mi ne estas lingvo-instruisto. Mi ne scias decidi, ĉu ĉi tiu metodologio taŭgas por prepari lingvolernajn studmaterialojn, por lingvolernado kaj helpado al lingvolernantoj. Mi ne scias kiel kaj kiomgrade oni povus difini konkretajn lingvo-konajn mezurojn laŭ ĉi tiu metodologio. Mi pensas, ke se ekzistas lingvo, en kiu oni povas apliki la striktan strukturon de la „viv-tajlita lernado”, tiu lingvo estas E-o. Se en E-o tio ne sukcesus, eĉ eksperimentoj estas vanaj en iu ajn alia lingvo. Sed, se jes: ĝi povas esti ekzemplo por aliaj lingvoj.

Jes, mi scias: se oni volas komenci tian provon, oni devus havi la E-lingvan tradukon de tiu metodologio. Sed mi estas malpacienca. La traduklaboro estas nur nun komencita kaj mi ne scias kiam ĝi finiĝos; sed mi jam nun demandas la legantojn de IPR: ĉu estas iu, kiu volonte kunlaborus kun mi en la eksperimento por pretigi studmaterialon de almenaŭ unu leciono de E-o kaj por elprovi ĝin laŭ la metodologio de „viv-tajlita lernado” ĉe adoltaj lernantoj?

Elkore vin salutas

Péter GERŐ (Hungario)

LA NAŬA

de **Rob MOERBEEK** (*Nederlando*)

Ne de Betoveno, sed de nia Akademio: la naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro. Longe ĝi restis nur mencio, kvankam *Heroldo de Esperanto* ja publikigis la tedan liston sen la difinoj, kaj *Ondo de Esperanto* faris el ĝi felietonon. Kaj la bona Akademio permesas spili ĝian retpaĝaron por mem elŝuti la trezoron.

Tamen la materialo ankaŭ por la ceteraj el ni restas koninda, certe por la instruantoj. Ofte oni supozas, ke ĉiuj jam posedas la iom kosten "Plenan Ilustritan Vortaron" (PIV), sed supozeble multaj el la plej uzataj, almenaŭ trastudataj vortaroj, baziĝis sur ĝia respektinda antaŭulo "Plena Vortaro" (PV, 1933 kun Suplemento el 1953). Kiom el la nova listo de 209 radikoj (vortoj ofte kun "kunmetaĵoj") estas jam konataj, sed nun unuafoje deklaritaj oficialaj? Fakte unu el po kvin estas zamenhofa radiko kaj nur 25, interalie tri lando/popolonomoj (el kiuj neniun entenas PV), aperis unuafoje en PIV. Sed ja la difinoj grave evoluis. Malofte ili identas kun tiuj en PIV, preskaŭ ne kun la PV-aj. Tamen esencaj la diferencoj ne ĉiam estas: kombino aŭ malkombino de signifoj ofte rezultigas la diferencon.

Sed unue ni laŭdu la Akademion pro ĉi tiu laborego: ĉefe, ke ĝiaj membroj ĝenerale konsciis, ke E-o estas celita por la tuta mondo, do ne tre helpas tradukoj en kvin eŭropajn lingvojn, eĉ se "grandaj".

La difinoj nun ricevis precizigon, aktualigon kaj detaladon. Nur la literpriskriboj (ikso, ipsilono kaj kuo – anst. ku [kaj kvo por la latina qu]) lakone trivortas. Ĉe "ĉasio", subparto de veturilo kun aksoj kaj radoj laŭ PV, okazis amputo de la signifo kaj ankaŭ la "karoserio" povis senbalastiĝi je stirilo kaj savzono (laŭ la PIV-a ilustraĵo). Aperis novaj fakoj: ekologio, komputado, seksaj vortoj (kvankam ankoraŭ ne ĉiulande senriskaj).

Maloftas ŝanĝo de la radika karaktero: (ant)arkta, zamenhofaj, fariĝis Antarkto kaj Arkto. "Bito" (ŝipŝtipo) ricevis homonimon kun noto (la proponata "ŝanono" ne aperas en PIV). Konata ŝanĝo estas, ke radaro (en PV sub "rado") jam en PIV aperas kiel radoaro por lasi al la moderna internaciaĵo radaro unusencecon. Evito de homonimeco klarigas ankaŭ, ke en PIV jam malaperis "rodulo" pro la "rodo de boatoj", do muso estas "ronĝulo": la naŭa oficialigas "ronĝi", t.e. la vorton!

Vortkategorie FOT nun estas substantivo, kaj "foto", nur kun la senco "fotaĵo", do ne plu signifas "fotado", kiel eblas laŭ PV, kie la radiko aperas kiel verbo.

Pinte gravas memori, ke la insulinproduktado okazas en la pankreaTo (for la s!).

La edukemon de SAT ekzemplas la PV-a komento ĉe "aperitivo": "... kiu laŭdire ekscitas la apetiton", samkiel la skeptika noto ĉe "prestigo": "Imponeco pro ŝajno de beleco aŭ gloro". (Vidu, kiom De Beaufront ĝuste nun influas!).

Jen la 25 ne-PV-aj vortoj (por konscii la evoluon) kaj diferencoj kun PIV:

Geografiaj: *brito, japano/Japanujo, Usono*.

Algoritmo: La naŭa kombinas la du signifojn el PIV.

Demografio: ne "esploro" sed scienco kaj informoj.

Diskriminacii: en PIV nur substantive.

Ekologio: en PIV ekologo estas sciencisto pri ekologio, scienco pri rilatoj; la naŭa aldonas "influoj ...".

Etno: ni nun vidas la diferencon disde "gento", kies anoj kredas al komuna deveno.

Eŭro: PIV klerigas nin pri la komenco en 1999 inter 12 ŝtatoj.

Festivalo: ne plu strikte perioda; i.a. pri "kino" anst. filmo.

Frustru: la "tendenco", kies mankon oni suferigas, fariĝis "deziro".

Karoserio: vd supre.

Kasedo: sen aludo al "kaseto", kiun ankaŭ PIV ne preferas.

Kibuco: identaj klarigoj.

Klono: PIV eliras de la verbo kloni. La korekto preventas interpreti "klono" kiel (la agon) "klonado".

Komputi kaj ~ilo: PIV krommencias la arkaiĝintajn signifojn "mezuri/~ilo".

Lasero: PIV klerigas nin pri la deveno de la akronimo.

Modemo: en PIV nur unuvoja eksplico de la konverto el analoga linea informo al sono (ĉe ricevo), tamen sufiĉa por dedukti la alian sencon.

Pico: "italdevena" manĝaĵo, sed PIV ja mencias Napolan specon.

Skani: evidente oni ne oficialigis la duan signifon en PIV pri radioricevilo.

Transistoro: same pri la signifo "radioaparato kun ~oj".

Tukano: en PIV mankis ĝiaj kolorriĉaj plumoj.

Versio: ne oficialiĝis la tria signifo: turno de naskiĝanto.

Vodko: rolas la fluo de ekonomiaj fortoj: restas Rusio kaj Pollando, sed Ukrainion kaj Finnlandon anstataŭas Svedio. PIV resendas al "viskio", sed

tiu oficialiĝis nur en 1919: pri zamenhofeco mankas spuro. La unua teatraĵo ja estis "Unua brandfaristo". (1896: L. Tolstoj, tr. V.A. Burenkov) .

Poste ni eble dividos la 209 laŭ semantikaj rubrikoj. Sed nun: bonan digeston!

44-a konferenco de ILEI, Kopenhago, 17-23 julio 2011

Kun lingvo de amo en la lando de Hamleto

En la jaro 2011 ILEI konferencos en Kopenhago, la semajnon antaŭ la UK, 17– 23 julio, kun la tradiciaj kleriga, faka, organiza kaj kultura programoj, kaj, kiel ĉiam, kun io nova. Tiel la konferencanoj povos plani unuvojaĝe dusemajnan restadon dum la du eventoj por plene ĝui la riĉajn konferencan kaj kongresan programojn, kaj konataĝi kun la kulturo de Danio kaj belaĵoj de ĝia ĉefurbo kaj aliaj vizitotaj lokoj.



Konferenca temo:

Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado

enfokusigas lingvan politikon kaj sintenon de ŝtataj kaj klerigaj instancoj, konsekvencojn de ties tiutemaj decidoj, staton kaj evolutendencojn de lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado konekse kun la oficiala lingva politiko, kaj pozicion de Esperanto en tiu kunteksto.

Simpozio pri la konferenca temo

ILEI ĉi-foje organizas la simpozion kunlabore kun la Universitato de Kopenhago, Fakultato de Humanistiko, Departamento pri komunikiloj, kognado kaj komunikado (<http://mcc.ku.dk/>), kiu ankaŭ disponigos la konferencejon kaj simpoziejon. La simpozio okazos en la lastaj du konferencaj tagoj, 22/23-an de julio, do tagon pli frue ol UK komenciĝos.

Loĝado kaj manĝado

La loĝado estos aranĝita en la hotelo Cabin, en kiu eblos daŭrigi la loĝadon dum la UK, kaj en malpli kosta studenta domo. Favorkosta manĝado eblos en la universitata bufedo kun varia oferto, apud la konferencejo.

Programo

Dimanĉo: alvenoj kaj interkona vespero.

Lundo: solena malfermo kaj komenco de laboro; dana vespero.

Mardo: daŭrigo de prelegoj, seminarioj, laborkunsidoj; internacia vespero

Merkredo: ekskursoj kaj alternativaj programeroj; distra vespero

Ĵaŭdo: pliaj prelegoj, kunsidoj, diskutrondoj; universitata agado; lingva festivalo; bankedo

Vendredo: simpozia tago kun ekskursoj alternative; adiaŭa vespero

Sabato: konkluda sesio de la simpozio, solena fermo; transiro al UK

Du tuttagaj ekskursoj ekster Kopenhago kaj duontagaj promenekskursoj tra la urbo kun lokaj esperantistoj kiel ĉiĉeronoj ebligas konatiĝi kun la lando de Hamleto kaj ĝia ĉefurbo.

Aliĝoj kaj mendoj

Aliĝilo kaj mendilo kun kotiztabelo, prezoj kaj pli detalaj informoj atingeblas rete tra <http://ilei.info/agado/konferencoj.php> en ambaŭ formoj: por elpresi kaj uzi paperan aliĝilon, aŭ por elektronika aliĝo. Papera aliĝilo aperos ankaŭ en la venonta numero de IPR.

Pliaj informoj: Konferenco 2011 <info@ilei.info>

Informoj pri ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Mireille Grosjean (prezidanto), Mónika Molnár (vicprez.), Reza Torabi (sekretario), Karine Arakelian, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu

Elekta: Tiekio Isikawa, Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute (gvid.)

Kontrolo: Ulla Luin, Simon Smits, Rudi Koot

Lerneja: Carola Antskog (gvid.), Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Julián Hernández (estrare), Tiekio Isikawa, Marija Jerković, Luigia Madella, Jacqueline Poux, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi

Regulara: Marija Beloŝeviĉ, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas (Estrare: Stefan MacGill)

Terminara: Maŭro La Torre (gvid.), Miroslav Malovec, Ilona Koutny (Estrare: Radojica Petrović)

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Aida Čížikaitė, Renato Corsetti, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat

Kunlaborantaj institucioj

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, cantskog@kolumbus.fi

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Viťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: +421 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj.

Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, 0049-55215983, Trejnsejnoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono:

Zsófia Kóródy, zsofia.korody@esperanto.de

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Stefan MacGill**

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Gregor Hinker**.

UEA: *Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*. www.uea.org. Observanto kaj A-komitatano de ILEI ĉe UEA: **Stefan MacGill**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**.

UN (Unuiĝintaj Nacioj): komisiito ĉe ILEI: **Rob Moerbeek**.

UNESKO (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, 72, *quai de la Loire, FR-75019 Paris*, francois.lojacomo@wanadoo.fr; **Monique Arnaud**, *Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac*, monique.arnaud@aliceadsl.fr; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60;

Membreco kaj pagado por aliaj servoj

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) **kaj 9 EUR en B-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 8 EUR por la A-landoj kaj 4 EUR por la B-landoj. Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al Julija BATRAKOVA, p/a Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, <persiko@mail.ru>.

La pagoj povas okazi pere de la nederlanda ILEI-konto, al la ILEI-konto ĉe UEA aŭ al la sveda konto:

* Pagoj al la nederlanda konto de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bv. aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo).

* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankokostoj. Indiku viajn nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).

* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Swedbank.

El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT-kodo SWEDSESS.

Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankokostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Hejmpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIEBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado**: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktejo**: NÉMETH József, *HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5*, <jozefo.nemeth@gmail.com>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-89) 356-050. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <r.moerbeek@wanadoo.nl>.

**La nunan numeron ni sendis al la presejo 23 aŭgusto 2010,
redaktofino por la sekva numero 15 novembro 2010.**



Prelego de Sylvain LELARGE dum Tago de la Lernejo en Kubo



Demonstra kurso de Ricko HUGIMOTO (JP) en la seminario de ILEI-Ĉinio

La 44-a Konferenco de ILEI

Kopenhago, 17-23 julio 2011

Post la neforgesebla semajno en Kubo, ILEI denove konferencos en Eŭropo. Ĉiujare alia kontinento: 2006 – Italio, 2007 – Japanio, 2008 – Benino, 2009 – Pollando, 2010 – Kubo, 2011 – Danio, 2012 – ni planas denove Azion. Pliaj informoj ĉe:

<http://www.ilei.info/>

Kaj ĉiujare la tradicia programo: kleriga, kultura, scienca, organiza, turisma, kaj ĉiujare io nova en la intima rondo de esperantistaj instruistoj:

- simpozio kaj seminarioj
- prelegoj kaj paneldiskutoj
 - komitatkunsido
 - lingva festivalo
 - ekskursoj
 - distraj vesperoj
 - bankedo

Konferenca temo:

***Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj
en edukado kaj scienca komunikado***

Simpozio: 22-23 julio 2011

Aliĝilo kaj pliaj informoj:

<http://www.ilei.info/agado/konferencoj.php>

info@ilei.info

